Norvega Esperantista Ligo

Laborplano por la periodo 2011–2013

(Aprobita de la Landa Kunveno 2011)

La jena laborplano, surbaze de la strategiplano por 2009–2013, precizigas la konkretajn labortaskojn farendajn dum la periodo ĝis la venonta Landa Kunveno, en 2013.

Ekstera informado:

Amaskomunikiloj
La estraro prioritatas havigi priparolon pere de la amaskomunikiloj, ekzemple tiel:
- dissendante gazetarajn komunikojn pri novaĵoj
- instigante la klubojn informi lokajn amaskomunikilojn kiam okazas io interesa
- instigante al la membroj verki leterojn de leganto pri debatata afero kiam la cirkonstancoj invitas al mencio de Esperanto

Interreto
La estraro prioritatas la retpaĝojn de NEL, tiel:
- certigante, ke www.esperanto.no havu redaktoron kiu respondecu pri konstanta ĝisdatigado
- prizorgante, ke informoj pri Esperanto ĝenerale, pri kursoj kaj aktualaj eventoj kaj pri havebla literaturo estu troveblaj rete
- konsiderante ĉu NEL ĉeestu en aktualaj retsocioj
- ofertante helpon al aliaj organizoj kiuj deziras krei retpaĝojn en Esperanto

Informbudoj/prelegoj
Ĉiuj informoj estu sobraj kaj precizaj. Por pli bone informi pri Esperanto la estraro konsilu membrojn pri:
- vizitoj en lernejoj kaj organizaĵoj por informi pri Esperanto
- informbudoj kaj disdonado de informiloj surstrate aŭ ĉe foiroj, ekz-e studentaj tagoj, lokaj kulturaj eventoj, internaciaj aranĝoj kaj simile

Informado en la norvega
La estraro prioritatas eldoni informojn pri Esperanto en la norvega, ekzemple aktualajn broŝurojn.

Instruado

Ĉeestaj kursoj
La estraro ĉiujare instigas, kaj se necese helpas plifaciligi, ankaŭ ekonomie, ke lokaj kluboj aranĝu kursojn por novuloj.

Interretaj kursoj
La estraro prioritatas, ke vizitantoj al niaj retpaĝoj facile trovu altkvalitajn interretajn esperantokursojn.

Al plenumintoj de kursoj la retpaĝoj de NEL atentigas pri la konstanta oferto de la legaco Uhlen pri subvencio al junuloj por ilia unua internacia Esperanto-aranĝo. Kursanoj konataj al ni ricevu ankaŭ oferton pri membreco.

Instruantoj
La estraro prioritatas subtenon al membroj kiuj deziras lerni instruadon de Esperanto.

Ofertoj al la membroj

Kluboj
La estraro tenas kontakton kun la kluboj kaj ofertas/interŝanĝigas ideojn por ilia aktivado. La estraro esploras la eblecon oferti specialajn favorojn al la membroj.

Seminario por membroj
La estraro laŭeble aranĝu seminarion por la membroj dum jaroj kiam ne okazas landa kongreso.

Ĉiama interna informado
La estraro prioritatas labori por
- eldonadi *Norvega Esperantisto*
- teni la retpoŝtlistojn *NEL-diskut* kaj *NEL-inform* aktivaj
- postuli jarraportojn de la lokaj societoj
- informi la membrojn pri la agado de la estraro

Lingva laboro

Vortara projekto
La estraro prioritatas havigi monon por akceli pluevoluigon de la vortara datumbazo.